


AVANCO

4/2001

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



**Kore, kare, fajre, strese
Ni kongresu ne nur lingve**



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
13-a jaro, n-ro 2 (4/2001)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)53 9102
kaj 40 4484
Fakso: 33 8729
Retadreso:
kubesp@ip.etecsa.cu

Ĉefredaktoro:
ALBERTO GARCÍA FUMERO
Revizias kaj kontrolas:
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO GARCÍA FUMERO
ALBERTO FDEZ-CALIENES BARRIOS
ROBERTO MOLINA GALVEZ

Prezo: (enlande) CUP 1.00
(eksterlande), NLG 2.00
aŭ 2 irk., pagendaj al la
UEA-konto: keax-u
Ĉiuj rajtoj rezervitaj
Reproduktado permesata
(bv. indiki la fonton kaj
sendi du ekzemplerojn al
la Redakcio).
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

Fotoj de la unuaj tri kongresoj de KEA, respektive en Teatro Mella, 1987; Muzeo de Sciencoj, 1996; kaj Nacia Biblioteko, 1999. La venonta nia kvara, reiros al la impona salono de la Muzeo de Sciencoj, sub la temo "Esperanto: Ĉu nur lingvo?"

estimataj

Promeso estas ŝuldo. Pro tio, jen la 4-a numero de Avanco, kiu ĉi-jare turniĝis en trimonatan bultenon. Finiĝas jaro de intensa laboro, kaj la rezultoj estas kontentigaj, kvankam tio ne signifas, kompreneble, ke ĉe ni ĉio iras glate, nek ke nia karega lingvo Esperanto finvenkis...

Kaj unu el niaj gravaj problemoj estas tiu rilata al la troa surŝultrigo da taskoj flanke de tiu ĉi redaktoro, kio bedaŭrinde prokrastigis la aperon de tiu ĉi numero.

Bonŝance jam ekformiĝas redakta teamo, kaj espereble baldaŭ ĉiuj zorgoj apartenos al iso, ne plu al aso nek al oso...

Antaŭ ol mi forgesos (mia memoro ne estas tro bona, plendas mia edzino), feliĉan novan jaron por vi ĉiuj!

Via redaktoro,
Mag. ALBERTO GARCÍA FUMERO

enhavo

Tiuj, kiuj ne havas Ĉapelilon...

ALBERTO GARCÍA FUMERO 3

La voĉo de Kubo per Interreto

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ 6

Faka evento en Havano

MARTA ALONSO GUTIÉRREZ 7

Tiel la mondo iras...

ALBERTO GARCÍA FUMERO 8

Kongrese tra la prismo de nia Budo

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ 10

...kaj por memlernado kaj por klasoj...

TINEC 12

Transe de la gramatiko

PIULO 13

Apudmara kultura festivalo

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ 14

Alifoje Guantánamo elvokis Zamenhof

ALBANIA DUTIL ALVAREZ 15

Tiuj, kiuj ne havas Ĉapelilon...

Laborante pri la nuna numero de *Avanco*, kaj iom ĝenita de miaj fuŝaĵoj antaŭ la klavaro (miaj problemoj troviĝas inter la klavaro kaj la seĝo, do mi mem devas esti la problemo) mi ree konsciis pri tio, ke ĝis nun ni ĉi tie en la sidejo ne disponas je kontrolo por la literumado. La plej ofta eraro en nia laboro konsistas el mistajpado. Duavice venas la gramatikaj kaj sintaksaj eraroj. Nu, en tiu Vindosa mondo tio ne devas konsistigi problemon: oni simple instalu Ĉapelilon, kaj tiu bonega programo faros la ceteron. Nu, bone, ne ĉion... Vi devos elpensi, kion Vi tajpos...

Vi scias, *Ĉapelo* estas tekstoprilaborilo por Esperanto. Ĝi ne nur provizas la necesajn tiparojn por presi tekstojn en Esperanto, sed ankaŭ enhavas kontrolilon por ortografio kaj aliaj eraroj.

Ĝis nun, ĉio en ordo. Sed... *Ĉapelo* kostas proksimume 250 markojn, kaj restas ankoraŭ ekster niaj kapabloj. Sed dum jaroj ni en la sidejo estas uzantaj diversajn rimedojn por solvi la problemon, aŭ pli ĝuste, la du problemojn: unu el ili estas tiu je la aperigo surekrana aŭ surpapera de la ĉapelitaj literoj; la dua, pli komplika, estas tiu je la kontrolado de la tekstoj. Mi klopodas ĉi tie superrigardi la ĉefajn rimedojn por tiuj, "kiuj ne havas *Ĉapellon*".

Aperigo de la ĉapelitaj literoj

La plej rekta aliro, en tiuj praaj tempoj antaŭ ol la unua komputilo enfalis en niajn ma-

nojn, estis tiu uzata de esperantisto kiu anstataŭigis kelkajn klavojn en sia tajpilo kaj tiel provizis al si la necesajn litertipojn. Kompreneble oni ĉiam povas uzi la tiel nomatan x-solvon, tio estas, anstataŭigo de la ĉ per cx, de la ĝ per gx, ktp. aŭ simple permane meti la ĉapelojn. Sed kun la paso de la tempo alvenis komputiloj, kaj ili turniĝis en aliancanojn. Kvankam ili kutime estis unue preparitaj nur por la "usona" alfabeto, tio estas, ne rekte kapablis aperigi niajn hispanlingvajn ñ aŭ á, des malpli la esperantajn ĉ aŭ ĝ, iom post iom "lertiĝis".

La unua komputilo, kiun mi uzis estas jam muzeaĵo: "inteligenta klavaro" provizita per *MSX-Basic 1.0*, kun 8-bita procezilo Z-80, kiu funkciis je la tiam fulma rapido de 4 MHz. Imagu, se Vi povas. La uzebla memoro estis nur 32 KBajtoj, multe malpli ol la kapablo de la nunaj 3,5-colaj diskedoj. Kvankam ni disponis je tekstoprilaborilo, ne eblis kontroli la tekstojn, nek ŝanĝi la litertipojn. La unusola maniero aperigi kaj presi esperantajn tekstojn estis verki programeton por anstataŭigo de la litertipoj en asembla lingvo, enmeti ĝin en la memoron kaj forgesi la tekstoprilaborilon... mi devis rekte tajpi la tekstojn. Mi mem fuŝumis per tia solvo.

Sed ni ne estis solaj: mi havas antaŭ mi ekzempleron de la malaperinta revuo *Interkomputo* en kiu aperas "facila solvo" por la esperantigo de la komputiloj Sinclair Spectrum kaj BBC, solvo aperinta sub la nomo de d-ro John C. Wells, poste Prezidanto de UEA. En ambaŭ kazoj temas pri pro-


grametoj verkitaĵ en asembli lingvo, kaj por variantoj de la tiam populara BASIC. Ĉar bonŝance jam estas pasintaĵ tiaj tempoj (1984) je "faru tion vi mem aŭ tute rezignu pri la afero", mi ne plu zorgos pri tiaj solvoj. Mi havas la esperon, ke neniu el vi bezonos ilin!

Poste venis potencaĵ, 256-Kbitaj komputiloj kun rapido je 12 MHz, kaj tekstoprilaboraj programoj kiel *WordStar*. Temis pri la tempoj de la operaciumo MS-DOS. Tiam (komence de la 90-aj jaroj) oni havis la ŝancon uzi profesiajn programetojn por kreado de la bezonataj litertipoj. Multaj el ni uzadis tiajn programojn kune kun *WordStar*, kaj kvankam ne videblis surekrane la ĉapelitaj literoj, la tekstoj presigis senprobleme. Bedaŭrinde mi forgesis la nomon de la ilo uzata, ĉar mia 5.25-cola disketo (ankaŭ nun muzeaĵo) difektiĝis (ĉu

vi ankaŭ memoras pri tiaj tempoj, Maritza, Alexis? Aŭ vi, Raola?). Al tiuj tempoj apartenis solvoj kiel ETDE, redaktilo por Esperanto. Iloj (klavara programo kaj VGA-literaroj en Latina-3 por MS-DOS kaj *Tipilo*, prilaborilo por ekrantiparoj, kiuj aperas sur la kompaktdisko *EspeROM*, surmerkata en 1997 de Germana Esperanto-Asocio.

Mac-komputiloj ne estas ofte uzataj en nia lando, kaj oni ne vendas ilin. Pro tio mi limigas min nur al ekzemploj por PC (IBM-kongruaj komputiloj). Tamen, ankaŭ aperis multaj solvoj por Mac OS, kiuj troveblas en la sama kompaktdisko.

Mirinda solvo estis *CHI-Writer*: tiu tekstoprilaborilo por sciencistoj. Ĝi permesis al ni ne nur aperigi kaj presi specialajn signojn uzatajn de matematikistoj aŭ fizikistoj, sed ankaŭ modifi la litertipojn por aperigo (sur-



Unired, programo por kontroli literumadon.

ekrana) de la ĉapelitaj literoj. Oni anstataŭigis kelkajn literojn (W, Y, ktp) per niaj ĉapelitaj literoj, kaj eĉ povis meti kaj Esperanton kaj la hispanan sur la saman tekston. Aĥ, tia komforto! Mi ankoraŭ konservas la diskedon.

Word Perfect 5.1 por MS-DOS brilis dum iom da tempo kiel eble la plej bona tekstoprilaborilo. Ĝi kapablis presi preskaŭ ĉiujn signojn, kaj inter ili troviĝis la de ni bezonataj. Oni devis nur uzi la tiel nomitajn "makrooj" por ke la klavokombinoj aperigu la deziratajn signojn. Ĝia unusola manko estis, ke la ĉapelitaj literoj ne aperis surekrane dum la tuta tempo, sed nur dum prova montrado de la teksto. Tiujn makroojn mi konservas, kaj ili ankaŭ aperas sur la kompaktdisko *EspeROM*.

La operaciomo Vindozo (kaj la grafikaj ekrankarto) pli kaj pli populariĝis, kaj post la unuaj klopodoj de la esperantistaro provizi nian alfabeton (Microsoft ne interesiĝas pri esperanta versio, male al tio kion faras la subtenantoj de, ekzemple, *Linukso*), aperis *Supersigno*, kies (ĉu provan?) version ni ankoraŭ uzas (ĉi tiu teksto mem estis redaktita helpe de *Supersigno*). *Supersigno* kreas esperantan version de ĉiu literotipo troviĝanta en Vindozo, kaj permesas ĝian aperigon per uzado de simplaj kaj intuitivaj klavokombinoj. Ĝi ankaŭ enhavas vortoliston, por ke oni povu kontroli, bedaŭrinde permanente, ĉu difinita vorto ekzistas (ĉu ĝi estas akceptata) aŭ ne (kvankam mi memoras pri tio, ke en olda versio por Vindozo 3.1 oni parolis pri kreado de propra vortaro). Kompreneble ĝin ni konservas kaj metas je la dispo de vi ĉiuj. *Supersigno* estas nur ilo por la aperigo de nia alfabeto, sed kia komforto!

Tiuj, kiuj laboras sur *Unikso/Linukso* solvas la problemon aperigi la esperantan signaron per uzado de *Tex* (kiu taŭgas por redaktado de tre komplikaj tekstoj), kompre-

neble sur grafika interfacio. Oni eĉ havas la eblecon uzi *Yudit*, kiu permesas redakti tekstojn en Unikodo.

Kaj jen ni alvenas al *Ĉapelito*, kiu estas kompleta tekstoprilaborilo tre simila al *Word* por Vindozo, kaj kiu ankaŭ permesas kontroli la tekstojn. Sed ĉar ni ne disponas je tiu profesia solvo de la afero, ni turnos nin al la dua problemo: kiel kontroli la tekstojn?

Kontrolado de la tekstoj

Simpla kontrolado de la tekstoj sur MS-DOS (ankaŭ sur Vindozo) eblas per *kl* versio 3.0, programo verkita de samideano Klivo Lendon en 1993. Ĝi kapablas pritrakti dokumentojn redaktitajn per *Word Perfect* por MS-DOS, *Word* por Vindozo (malnovaj versioj) kaj *Write* (ankaŭ por Vindozo). Oni povas reprezenti la ĉapelitajn literojn per kombinoj de x (cx anstataŭ ĉ), h (ch anstataŭ ĉ) ĉirkumflekso (^c anstataŭ ĉ) aŭ uzi la signaron de *Word Perfect*. La uzado estas simpla, entajpado de la komando:

```
kl teksto.txt
```

aperigos surekrane la tekston kun markado de la mistajpitaj vortoj. Se oni deziras ricevi liston je tajperaroj, oni entajpu

```
kl teksto.txt eraroj.txt.
```

Eblas uzi suplementan vortaron, kreandan de la uzanto por tiuj vortoj, kiuj ne troviĝas jam en la programa vortaro. Kompreneble tio postulas iom da laboro, sed iom post iom oni povos kontroli pli kaj pli komplikajn tekstojn.

Por tiuj (kiel mi mem) kiuj kutime uzas la operaciomojn *Unikso* aŭ *Linukso* la solvo al tiu ĉi problemo troviĝas en *Ispell*. Tiu ilo, kutime troviĝanta en ĉiuj versioj de tiuj operaciomoj, permesas kontroladon de tekstoj senformataj en kiu ajn lingvo, kondiĉe ke ekzistu la vortaro. Kompreneble la modernaj versioj enhavas la necesan vortaron por Esperanto, do oni povas simple entajpi:

ispell -d eo teksto.txt

(ekzemple) por kontrolado. Eblas komforte aldoni al la vortaro novajn vortojn, aŭ ordoni, ke ĝi korektu la mistajpojn. Ankaŭ eblas uzi tiun vortaron por la kontrolado de retmesaĝoj. Mi ne konas la ekziston de kontroloj por dokumentoj alitipaj, kiel ekzemple tiuj je oficejaj tekstoprilaboriloj (*StarOffice*, *KOffice*) aŭ Majkrosoftajn (*Word*-formataj), do mi bonvenigas informojn.

Plia solvo por Vindozo aperas en la programaro Unired, kiu permesas redakti tekstojn en Unikodo. Per la signaro Unikodo oni kapblas reprezenti la alfabeton de preskaŭ ĉiuj lingvoj en la mondo. Bedaŭrinde ne multaj programoj kapblas akcepti Unikodon. *Unired* enhavas version por MS-DOS (kaj Vindozo) de la programo *IsPELL*, kaj same funkcias.

La esperanta signaro sur TTT-paĝoj

Bedaŭrinde ankoraŭ nur malmultaj navigiloj kapblas uzi Unikodon, do la plimulto el la TTT-paĝoj ne uzas ĝin, sed la x-kombino aŭ la karaktraro Latina-3. Escepto por la aperigo de la esperanta signaro estas la bonega *Perl*-programaro *Kameleono*, kiu, instalita sur TTT-servilo permesas al la "surfisto" laŭvole aperigi la tekstojn en sia navigilo laŭ la x-kombino, laŭ h-kombino, laŭ Latino-3 aŭ laŭ Unikodo. Jen vera kameleono!

Kaj nu, bone, eble iu el vi demandos kial mi redaktis ĉi tiun artikolon por kelkaj tro – por al aj iom – teknika. Okazas, ke pli kaj pli niaj kubaj samideanoj havas la ŝancon uzi komputilon kaj ne ĉiam scias kiel ĝin "esperantigi"...

ALBERTO GARCIA FLMERO

La voĉo de Kubo per Interreto



Radio Havano Kubo
Esperanto-Redakcio
Poŝtfako 6240
Havano
Kubo

radiohc@ip.etecsa.cu
www.radiohc.cu

Ekde la pasinta septembro Radio Havano Kubo elsendas pere de *Real Audio* interrete, kio sendube konsistigas gravan paŝon en la disvastiga laboro de tiu elsendejo, kiu uzas Esperanton ekde la jaro 1988.

Ĝi dimanĉe oni povas daŭre aŭskulti la esperantajn elsendojn per mallongaj ondoj en la frekvencoj je 25 metroj ĉe 11 760 kHz kaj 21 metroj ĉe 13 715 kHz je la 15a kaj 22.30 horoj UTC.

Kiel sciante, nuntempe en la mondo pli kaj pli svarmas komputiloj kaj populariĝas Interreto kiel moderna kaj efika komunikilo, kaj pro tio Radio Havano decidis iniciati novan etapon en sia ĝenerala laboro. Se vi emas je radioaŭskultado, nun vi povas pli bone nin kapti dimanĉe je la 15a horo UTC per via komputilo, do, klaku sur la jenan adreson: www.radiohc.cu

Kiel kutime ni atendas viajn reagojn, komentojn, kritikojn kaj sugestojn!

MARITZA GUTIERREZ GONZALEZ,
E-redakcio

Faka evento en Havano

*Pedagogio, gastronomio, ĵurnalismo, eldon-
agado, ekologio, medicino, modo...*

*La provinca filio de KEA en Urbo Havano
okazigis provincan Seminarion pri Apliko de
Esperanto en Scienco kaj Tekniko.*

*La okazo montriĝis tre fruktodona ne nur
pro la prelegoj, sed pro la diskutoj, kiujn tiuj
vekis ĉe la partoprenantoj.*

La 18an de novembro en la Centra Havana sidejo la ĉefurbaj esperantistoj kunsidis por interŝanĝi spertojn pri diversaj fakoj. Ĉeestis pli ol tridek esperantistoj el kiuj dek prelegis diversteme.

Maritza Gutiérrez prelegis pri "Esperanto kaj stilo en ĵurnalismo". Ŝi donis multajn konsilojn por tiuj, kiuj raportas pri eventoj aŭ artikolumas por gazeto aŭ radio. Ankaŭ ŝi informis al ni pri la diferenco inter raportado por gazeto kaj raportado por radio.

Juan Ramón Rodríguez raportis pri la "Laboro farita de la Komisiono pri Historio de la Esperanto-Movado en Kubo". Li parolis pri la pioniroj, kaj konsciigis nin pri tio, ke se ni deziras sciigi la estontan esperantistaron pri nia historio, tiam la laboron ni komencu nun.

Pedro Fernández Rodríguez prelegis pri "Uzo de la nigra tabulo en instruado". Li sciigis nin pri la graveco uzi la tabulon ĝuste kiam ĝi estas bezonata, kaj klarigis al ni kial ĝia trouzado malhelpas la instruadon.

Julián Hernández Ángulo, en sia prelego "Parolkapabligo de la gelemantoj pere de monologoj", parolis pri la metodologio por enkonduko de monologoj dum la leciono, pri la graveco paroligi niajn lernantojn kiel

eble plej frue, ĉar fluecon ni atingos nur se ekde la unua leciono ili parolas Esperante.

Cirilo Ramos Piñeiro, en sia prelego "La kuba kuirarto", parolis pri historio de la kreola kuirarto, enkonduko de kelkaj fruktoj en Kubon kaj pri la deveno de diversaj insulaj pladoj.

La prelego de Liudmila Kaŝtanova "Kiel vesti sin elegante per malmultaj vestaĵoj" estis tre interesa, ĉar laŭ ŝi, kaj virinoj kaj viroj kutime kunportas multajn nenecesajn vestaĵojn dum vojaĝoj. Ŝi ankaŭ sciigis nin pri la maniero samtempe aspekti elegantaj kaj ŝpari lokon en nia valizo. Je la fino ŝi montris diversajn vestkombinojn por virinoj kaj viroj.

Alberto Fernández-Calienes prelegis pri "Eldonado". Li parolis pri la bezono, ke niaj eldonoj havu kvaliton kaj interesan enhavon; li ankaŭ parolis pri la bezono okupiĝi pri tradukoj el la kuba literaturo.


Miguel Ángel González (sufiĉe serioze) prelegis pri "Tago kaj nokto: la blato". Li analizis la danĝeron kiun ili konsistigas por la homa sano, kaj la diversaj manieroj likvidi ĝin.

Fernando Paredes Elósegui prelegis pri: "La haŭto, vivanta fabriko de mirindaĵoj". Li informis al ni pri kemiaj aspektoj kaj pri manieroj resti sanaj.

Marta Alonso Gutiérrez parolis pri la tiel nomata komposto. Subbaze de spertoj kiujn ŝi havis en Londerzeel, Belgio. Dum la prelego ŝi parolis pri kiel produkti tiun materialon, kion oni povas kaj ne povas uzi kaj pri la avantaĝoj de tiu materialo.

Kiel vi povos konstati, la aranĝo estis tre interesa kaj amuza kaj ĉiuj ĉeestantoj multe lernis pri diversaj fakoj.

MARTA ALONSO GUTIÉRREZ



Tiel la mondo iras...

Jen intervjuo al Julián Hernández Angulo, dum multaj jaroj prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, kaj nia plej populara komponisto en Esperanto. Ĉiuj el ni konas kaj ripetas liajn kanzonojn, kiuj etosigas niajn renkontigojn. Julián delonge ŝuldis al mi la intervjuon, do...

D: Nu, vi de antaŭ multaj jaroj kantas kaj komponas. Ĝuste de kiam?

R: Mi komencis en la duanivela lernejo, kiam mi kantadis en la muzikensemblo "La Atomoj" Imagu! Tiuj estis la tempoj de BE-JAE (Brigadoj Studentaj "José Antonio Echeverría"). Poste mi lernis ludi gitaron kaj komencis komponi en la artaj grupetoj de la Pedagogia Instituto...

D: Kaj via unua kanzono en Esperanto?

R: "Certe samideanoj", en la jaro '81... antaŭ ol vi demandas, "Tiel la mondo iras" estis komponita en 1983... (rideto).

D: Ĝi ja estas la plej populara. Kiel vi klarigas tion?

R: Ĝin mi plej ofte kantis kaj kantas, eĉ nun. Kaj la rekantaĵo ŝajne estas "algluigema"... same okazis antaŭe al "Maria".

D: Ĉu vi estis solisto jam dekomence?

R: Ne, mi ĉefe kunkantis kun Martín Castro (iama sekretario pri Kulturo, N.d.I.R.) kaj kelkfoje akompanis nin José Antonio Consuegra. Oni surbendigis la kanzonojn por la elsendoj de Radio Havano Kubo... Kelkfoje temis pri esperantaj versioj de popularaj hispanlingvaj kanzonoj, kiel "Mariela", "Venu nun la espero", esperantigita de Orlando Raola, aŭ "Simpla prezenco", tradukita de Andrés Pñera. Nur poste mi solkantis.

D: Kion vi preferas, la originalajn kantojn aŭ la esperantigitajn? Oni diras, ke traduko estas arto tiukampe...

R: Mi preferas originalaĵojn.

D: Vi kelkfoje portas T-ĉemizon kun la devizo "Mi trovis amikojn", kiu estas teksto de unu el viaj kanzonoj. Ĉu temas pri mem-

propagando? (Rido). Mi memoras, ke la muzikisto Chori anoncis sin per kretaj skribaĵoj surmuraj, en la sesdekaj jaroj...

R: Brazilaj samideanoj el la ensemble "Nova Erao" surprizigis min per tiu donaco... Ili multe ŝatis la kanzonon. Ne, ne temas pri mempropagando... (Kunridado).

D: Sed certe vi ja estas propagandilo de Esperanto... Vi aperis en la kovrilo de la septembra numero de "Esperanto" en 1993 kaj multfoje en la enaj paĝoj. Oni eĉ mencias kaj vin kaj Héctor Jiménez en la memorlibro pri la Seula Kongreso. Vi estas etosiginta sufiĉe da internaciaj artaj vesperoj dum UK-oj, kaj ILEI-Konferencoj, krom niajn lokajn renkontiĝojn, do, ne estas problemoj. Vi eĉ rajtus mempropagandi... Viaj kanzonoj jam estas parto de nia Esperanta kulturo. Kiu estas via revo pri tio? Ĉu ni rajtas scii?

R: Jes, kompreneble! Mi revas pri esperanta muzikensemblo... Ĝis nun, pro diversaj kialoj, en nia lando tiaj grupoj ne stabilas. Troas laboro kaj mankas tempo, sed se oni povus arigi ensemblon...

D: Nu bone, mi jam devas sidiĝi antaŭ la komputilo kaj entajpi ĉi tion... Avanco riskas ŝanĝi sian nomon al "Retroiro", ĝi malfruigas... Ĉu vi kapablus fini ĉi tiun intervjuon per la teksto de unu el viaj kanzonoj?

R: Nu bone, ĉar la disvastigo de Esperanto estas nia tasko, mi petus:

"Venu la manoj de ĉiuj,
Kiu deziras
Aldoni sian helpon
Por puŝi la ĉaron..."

Intervjuis:

ALBERTO GARCÍA FUMERO



Julián koncertas en Valencio, dum la 78a UK de Esperanto, 1993. Foto Arkivo de KEA.

Kongrese

tra la prismo

de nia Budo

Tre bonajn rezultojn atingis la Budo Ameriko dum la 86a UK en Zagrebo, laŭ takso de Atilio Orellana Rojas, plurjara spertulo por la agado en nia regiono.

Tradicie nia budo montriĝas vigla rilate al informado pri la agado por Esperanto en tiu ĉi parto de la mondo. Krome, ĝi ebligas enspezon por la Fondajo Ameriko, kiu subtenas diversajn projektojn.


Ĉi-jare la deĵorado ĉe nia stando havis specialan karakteron pro la fakto, ke dum 2002 okazos la 87a UK en Brazilo. kaj tiu lando muntis sendependan standon apud la nia. Tio ne signifis dividon de fortoj, sed aldonan apogon, ĉefe el informa vidpunkto.

Centoj da esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo vizitis nin dum la Zagreba kongreso. Kelkaj el ili serĉis informojn pri la nuntempo de Esperanto en Ameriko. Aliaj interesiĝis pri estontaj eventoj aŭ renkontiĝoj, sed la plimulto montris sian deziron iamaniere helpi la poramerikan agadon, kaj cele al tio aĉetis diversajn esperantaĵojn.

Didaktikaj materialoj, kasedoj kun divers-tipa muziko, manfaritaĵoj, libroj, gazetoj, glumarkoj, magnetoj, kalendaroj kaj aliaj propagandiloj aŭvenis en la budon danke al kontribuo de la delegitoj de nia Kontinento, ĉefe Atilio, Normand Fleury, Johano Bachrich, kaj la reprezentantoj de Kubo kaj Brazilo teame.



Kunsido "Kubo en la Latinamerika Kuneksto", kunordigita de I'KEK. Sur la podio, de maldekstre, Juan R. Rodríguez, Maritza Gutiérrez kaj Vincent Charlot, reprezentanto de UEA ĉe UNESCO en Parizo.



La plej granda kontribuo alvenis el Kanado, lando kiu devis laŭorde atenti la budon. Bedaŭrinde ne eblis al kanadanoj atenti ĝin, kaj la tasko falis sur Kubon. Tial oni proponis al mi, membro de la Komisiono Ameriko, preni la torĉon.

Mankis tempo, kaj oni devis pretigi ĉion preskaŭ vetkure... krome, la anstataŭado postulis de la Komisiono serĉadon de monaj rimedoj por la vojaĝo kaj loĝado...

Kaj jen mi deĵore ĉe nia Budo Ameriko... por mi estis nova sperto partopreni kaj samtempe ne partopreni Universalan Kongreson, ĉar mia tasko kompreneble ne estis atenti kunsidojn, sed atenti la budon, do oni devis ĉion rakonti al mi poste.

Tamen, mi havis ŝancon partopreni la kunsidojn de la Komisiono Ameriko, kaj la kunsidon pri Kubo ene de la Latinamerika kunteksto, kunordigita de Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo, danke al tio, ke nia estraranino pri Financo, Marta Alonso, anstataŭis min.

Ankaŭ, tiukaze danke al Eddy Raats kaj Osmo Buller, Maritza, Héctor, Marta kaj mi partoprenis la tuttagan ekskurson al la suda marbordo (Opatjia). Tre proksime, en Lovran, post la UK, okazis la ILEI-Konferenco, kiun partoprenis Maritza, Héctor kaj mi.

Sed verdire, kvankam mia tasko ne donis al mi tro da ŝancoj kongresumi, mi sufiĉe ĝuis la kongresan etoson kaj celere ĉiunokte enfalis la liton same lacega kiel la "normalaj" kongresanoj...

Tiu ĉi ne estas la sola problemo: plian problemon, por homo tiel fumema kiel mi, konsistigis restado dum tiom da tempo sen fumado. Tio turnigis sekundojn en horojn kaj minutojn en tagojn.

Iam mi fumis en loko kie tio estis malpermesita (mi juras, ke mi ne scias pri tio), kaj elstara nefumanto "konvinkis" min tuj iri eksteren. Senkuŝpigu min denove, s-ro Moerbeek!

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

...kaj por memlernado kaj por klasoj...

*Nuevo Método
de Esperanto
para Clases
y Autodidactas.*
Fernando de Diego.
Unua Eldono,
Heroldo de Esperanto, 1982.
214 paĝoj.

lam, serĉe de aliaj aferoj, mi trovis en nia biblioteko sideja interesan libron. Temas pri *Nuevo Método de Esperanto para Clases y Autodidactas* (Nova Esperanto-metodo por klasoj kaj memlernantoj). Nu, diris mi al mi mem, jen io interesa: unu el la plej gravaj, esperanto-tradukistoj, s-ro Fernando de Diego, pretigis ĉi kurson! Lasu min vidi... jen.

Kaj mi trafolumis la libron, senkonsidere de tio, ke la komisiito pri la Biblioteko ja devis foriri pro urĝaj taskoj...

Vere la libro estas leginda. La kurso konsistas el dek interesaj dialogoj, kiuj estas ĉeneroj de historieto, bonaj gramatikaj klarigoj kaj ekzercoj rilataj al ĉiu dialogo, kla-

rigoj pri interpunkcio en Esperanto, ktp. Oni eĉ trovas nociojn pri metriko, bona afero por komencantoj, ĉar ili multfoje deziras verketi en la internacia, kaj sugestoj pri bonaj libroj legendaj de tiu, kiu deziros plibonigi sian scion pri Esperanto.

La gramatikajn klarigojn mi trovis aparte utilaj, ĉar ni hispanlingvanoj ofte eraras rilate al la uzado de prepozicioj. Komencantoj preskaŭ neniam kaptas je la unua provo la diferencon inter "kuri sub la lito" kaj "kuri sub la liton" aŭ tiu inter "tra" kaj "trans", ekzemple. Sur la paĝo 98 oni povas trovi bonegan klarigon pri kiamaniere traduki la hispanlingvajn formojn: "echarse a...", "ponerse a...", "seguir + verbo", "andar + verbo", ktp.

La ekzercoj post ĉiu dialogo gamas disde sufiĉe facilaj ĝis kaprompaj, do estas io por ĉiu. Ĉar ĉiukaze temas pri frazoj eltiritaj el ĉiutagaĵoj, komencanto povas facile enŝovi la esprimojn en konversacion, kaj tiel impresi la kunlernantojn...

Kiel anoncas la titolo, la libro povas senprobleme esti uzata kaj por memlernado kaj por klasoj. Tial mi tuj ĝin uzis por pretigo de "ekspresa", fulma kurso kiun mi estis devigita pretigi eĉ pli eksprese... do atentu, instruistoj! Resume, bonega...

TINEO

– Diru, PIVulo, ĉu ĉi tio, kion mi diras: “mi iros al la transa trotuaro” estas korekte dirita?

– Kion vi celas? Vi iros do al tiu trotuaro, kiu troviĝas antaŭ ni, ĉu ne?, Tiukaze vi pravas, kaj eĉ pli bone vi diru: “en la transan trotuaron”, por substreki la ideon pri movo.

– Klarigu al mi iomete la aferon, PIVulo. Mi ĉiam timas, ke mi faros eraron. Kaj mi povus ankaŭ diri “mi sukcese transpasis ekzamenon”?

– Metafore, mia opinie... mi dirus “trapasis”. Kaj cetere, gratulojn!

– Haltu tie. Kia estas la diferenco?

– Aĥ, bone, la diferencoj! Nu, mi provos klarigi: la senco de la prepozicio *trans*, en la hispana, estas “al otro lado de”. Ekzemple: “la vendejo troviĝas *trans* la strato”, tio estas: “la tienda se encuentra al otro lado de la calle”, “la kato kuris *trans* la ĉambro”. Mi povus kotopoi, sed laŭ via mieno, vi jam kaptis la ideon. Kaze ke oni uzu ĝin prefikse, la senco estos aldonita al la alia vor-

to: *transiri*, *transigi*, *transplanti*, *transporti*.

– Kaj kio pri “tra”? Kial mi ne povas...?

– Vi povos fari kion ajn. Sed se vi deziras korekte paroli Esperanton, atentu: “tra” estas plia prepozicio. En la hispana ĝi signifas “a través de”, “de extremo a extremo”. Tial vi povos diri: “mi iros *tra* la strato” (“iré de un extremo a otro de la calle”), “jeti la domon *tra* la fenestro”, ktp. Uzata prefikse, “tra” signifas “de principio a fin”, same tempe kiel *space*.

– La hundo bojis *tra* la tuta nokto...

– Mi tralegis la libron...

– Mi tranoktis en la hejmo de mia fianĉino...

– Espereble ne diboĉe...

– Tute ne! La patro estas pli feroca ol leono... temas pri ŝerco. Sed vere mi jam komprenas. Do, “trapasi ekzamenon” bone esprimas la senco de mi serĉitan.

– Tiukaze, kara amik’, mi laŭiros la straton, ĝis mi trovos adreson de amiko. Ĝis la!

– Kio estas tio? Kion vi celas per tiu “laŭiri”?

Nu, bone, tio estas tempo por pli longa konversacio... venu kun mi!

PIVulo

*Feliĉan Kristnaskon
kaj sukcesan Novan Jaron 2002!*

Apudmara kultura festivalo

Post pluraj streboj kaj lastmomenta ŝanĝo de sidejo, sukcese okazis la kultura festivalo de Esperanto en Havano en la apudmara kampadejo Celimarina, tre proksime de la urbo.

La havananoj gviditaj de Julián Hernández sukcesis rapide aranĝi sidejon kaj pro-

gramon en bona kunlabora agado kun spertaj esperantistoj kaj estraranoj. En Celimarina, inter kabanoj kaj palmoj, renkontiĝis pli ol 40 esperantistoj el Havano, Sancti Spíritus, Bayamo, Camagüey kaj Santiago de Cuba por kune ĝui per Esperanto nian kulturon na-

cion, internacian kaj ankaŭ la naturon de la norda marbordo de nia ĉefurbo.

Varia programo inkluzivis prelegojn pri Raymond Schwartz flanke de Maritza Gutiérrez, dum Cirilo Ramos prelegis pri kuba kuirarto; Norberto Díaz gvidis rondan tablon pri E-kulturo kaj Pedro Fernández gvidis programerojn kiajn konkurso pri deklamado, kiun partoprenis ankaŭ geinfanoj, legadkonkurso, lotumado, konkurso pri teatraĵoj, kaj aliaj.

La vesperaj programeroj ofertis kantojn voĉe de Julián kaj Héctor kaj aliaj esperantistoj kiuj kantis kaj deklamis kubajn kaj originalajn esperantajn poemojn. La konkurso pri teatraĵoj gajnis Yoandra Rodríguez.

Dum arta vespero en la sidejo de la municipo Centra Havano estis prezentita folkloro danco flanke de geesperantistoj el Havano, kiuj akompane de tamburistoj kaj dancistoj el provinco Granma reprezentis kantojn kaj dancojn el la nacia folkloro Afrik-devena.

Bela fermo estis la stile karnavala kongao per tamburoj kiu dancigis la festivalanojn kaj invitis al nova renkontiĝo en Santiago de Cuba por plifirmigi la esperantan kulturon kiel esprimo de la nacia kulturo de kiu aŭ lando.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



Supre, la festivalanoj pozantaj por la historio; sube, Yoandra Rodríguez, aktorino. Fotoj: Alejandro García Acosta.

deziras korespondi



Julio S. Bastida Vaillant,
Calle 29F No. 11406
entre 114 y 116, Marianao,
11300 Havano

Mijaíl Mieres Miranda,
Maloja 127
entre Rayo y San Nicolás,
Centro Habana,
10300 Havano

Bárbaro Lezcano Palacio,
Independencia 1903
entre Victoria kaj Colón,
Cerro,
10600 Havano

Geonel A. Menés Gorea,
Calle 227 # 21005
entre 210 y 214,
Rpto. Fontanar. Boyeros,
Havano

Estrella L. Cortés Rodríguez,
Zapata 1872 ap. 3
entre 12 y 14, Vedado
10400 Havano

De la 13a ĝis la 16a de decembro 2001 okazis Tutlanda Renkontiĝo en la tendaro Yakabo, municipo Imías, en la provinco Guantánamo.

Partoprenis ĝin geesperantistoj el Holguín, Urbo Havano, Santiago de Kubo, Sancti Spíritus kaj kompreneble el Guantánamo.

La partoprenintoj ĝuis prelegojn, poemojn, ludojn, kanzonojn kaj ankaŭ sportumis. Ankaŭ renkontiĝis infanoj esperantistaj kun neesperantistaj por babili kaj ilin sciigi pri nia lingvo. Poste venis frateca artomatenado kaj kultura aranĝo en la loka Kulturdomo.

Oni profitis la okazon viziti la strandon Playitas de Cajobabo, loko kie José Martí kaj Máximo Gómez elŝipiĝis kiam ili venis en Ku-

bon por la sendependiga milito, kaj la domo-muzeon de Salustiano Leyva, kiu gastigis la heroojn post tiu elŝi-

piĝo. La etoso estis vere agrabla, kaj sendube fruktodona. Teksto kaj foto:

ALBANIA DUTHIL ÁLVAREZ

Alfoje Guantánamo elvokis Zamenhof



Historiaj klarigoj en Playitas de Cajobabo.

4a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio

**Esperanto:
Ĉu nur lingvo?**

Muzeo de Sciencoj "Carlos J. Finlay"
Havano, 6a-9a de marto 2002

**Kuba Esperanto-Asocio
19a Komitatkunsido**

**Survoje
al pli altvaloraj
atingoj**

Havano,
25a-27a de januaro 2002

**Seminario
pri Instruado**

Metodiko
Instruhelpiloj
Instrumetodoj

Havano, majo 2002

Informoj ĉe la sidejo de KEA

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro